# *La kubaj sindikatoj kongresas: defioj kaj kontribuoj de la laboristoj*




Havano, 22 apr (RHK) La 21-a kongreso de la centralo de kubaj laboristoj (CTC) sesias en Havano kun partopreno de mil 200 delegitoj el ?iuj provincoj kaj el diversaj laborsferoj ?tataj kaj ne ?tataj.

En la dua labortago la delegitoj ricevis raportojn de la ministerioj kaj prezidantoj de naciaj institutoj kun la celo analizi kaj dividi informojn pri la ?efa areoj, programoj kaj prioritatoj de ?iu sektoro. Aliaj celoj de la dialogo estis montri la gvidliniojn de la nuntempo kaj estonteco.

?i-lunde sesios 5 laborkomisionoj en la kongresa palaco de Havano kaj ili pritraktos, interalie, la sindikatan funkciadon kiel nepra devizo por altigi la gvidan rolon de la organiza?o; ili anka? analizos la kontribuojn de la laboristoj en la ekonomia efikeco de la lando kaj la rolon de la sindikato en la plenumo de siaj prioritatoj.

Aliaj temoj de la komisionoj rilatos al la defendo de la rajtoj kaj devoj de la laboristoj kaj rekono al la agado de la sindikatoj en la spacoj de mastrumado kun la labordonantoj.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/188910-la-kubaj-sindikatoj-kongresas-defioj-kaj-kontribuoj-de-la-laboristoj

# Radio Habana Cuba